Ĉi tiu kampanjo okazu kadre de pli vasta strategio, kiu inkluzivu ekzemple, ke Landaj Asocioj diskonigu la reklamojn al sialandaj kaj EU-parlamentanoj, varbado de kursanoj ks. Tio altiros la amaskomunikilojn, kaj Esperantujo vigliĝos.

Mia unua reklamo kostis pli ol 70 000 eŭrojn, kaj la prezo trioniĝis kondiĉe al dek-foja ripeto. La nuna UEA-havaĵo larĝe sufiĉas por tio. Kion la esperantistaro opinias?

Mi dankas al Seán Ó Riain, Renato Corsetti, la estroj de Landaj Asocioj kaj tradukistoj pro la valora kaj sindona apogo dum nia febra kontaktado.

Etsuo Miyoshi

Lasta invitilo al la kunkongreso en Edinburgo

La organiza skipo de la kunkongreso de Esperanto en Edinburgo varme invitas vin partopreni tiun pintan mikson de kvalito kaj internacieco. Prelegos ne nur niaj plej konataj kontribuintoj kiel Paul Gubbins ("Roksano: La morgaŭa virino") kaj John Wells (pri Esperanto por la ĝenerala publiko), sed ankaŭ esperantistoj nebritaj kiel Marteno Miniĥ, Jakvo Schram

kaj ĉefgastparolanto István Ertl, kiu trifoje prelegos. Komencantoj (jam tri petintaj ĉeston pere de NoJEF) simile spertas, sub gvido de Grainia Opulskienė kaj Tim Owen. Kvar internaciuloj partoprenos komedikvizon por amuzi la spektantaron kaj ne forgesu, ke dumsemajnfine okazos gvidata vizito al la parlamentejo.

Sed ne nur tio! Jam preskaŭ duono de la aliĝintoj elektis

Helpu meti Esperantajn librojn en la interreton!

Kiam oni enretigas Esperantan libron, oni disponigas ĝin al novaj legantoj: al tiuj, kiuj ne havas aliron al la paperaj eldonaĵoj; al tiuj, kiuj ne havas monon por aĉeti ilin; al tiuj, kiuj preferas legi per legoplato kiel 'Kindlo' de Amazon; kaj al blinduloj.

La fama Projekto Gutenbergo havas pli ol 33 mil bitlibrojn (enkomputiligitajn librojn), en multaj lingvoj, inkluzive de kelkaj en Esperanto. Bazite en Usono, la originala Projekto Gutenbergo devas sekvi la usonajn leĝojn, laŭ kiuj nur la libroj eldonitaj antaŭ 1923 estas ekster kopirajto, sed ekzistas filioj ankaŭ en aliaj landoj. Kanado havas relative favorajn leĝojn pri kopirajto, kaj tial la kanada filio eble graviĝos kiel depono por Esperantaj bitlibroj.

Vizitu la retejon www.pgdpcanada.net, se vi volas helpi, aŭ nur informiĝi pri la laboro. La retnomo estas mallongigo de "Project Gutenberg Distributed Proofreaders Canada": 'distribuitaj provlegantoj' signifas, ke multaj homoj, diversloke en la mondo, povas kunhelpi por

elsarki la erarojn el transskribo. Por kontribui al tiu laboro necesas krei konton en la menciita retejo, sed tio estas rapide kaj facile farata. Poste oni povas iri al 'Project Search', elekti la lingvon 'Esperanto', kaj 'Search'. Troviĝas nun du Esperantaj libroj, kiujn oni provlegas, sed verŝajne venos pliaj.

Kiam oni provlegas, oni vidas bildon de la paĝo supre, kaj transskribon sube. Oni komparas ilin kaj redaktas la transskribon, kiam necesas. La laboro certe ne estas ekscita, sed tute agrabla, se oni havas ĝustan humoron. Oni povas ekzemple fari du-tri paĝojn vespere, kiam oni estas tro laca por fari ion pli penigan.

Edmund Grimley Evans

Ĉu vi kuiras ĉine?

Kun la afabla permeso de Nicole Piron, mi enretigis tri el la 'Ĉu'-romanoj de Claude Piron (www.rano.org/piron). Mankas ankoraŭ la unua, *Ĉu vi kuiras ĉine?*, parte pro tio, ke mi ne trovis ekzempleron de la unua (1976) aŭ dua (1983) eldono. Ĉu iu povas helpi min?



Turo de la preĝejo de S-ta Georgo Okcidenta (St George's West), fotita el la placo Shandwick Place. La impona turo kronas la ĉi-jaran kongresejon en Edinburgo.

daŭrigi la Esperantumadon per ĉesto de la dutaga postkongreso, kiu vizitigos nin al Glasgovo, Kapelo Rosslyn, Distilejo Glengoyne, Lago Lomond kaj la Radego de Falkirk. Do ideale ne maltrafu la okazon vidi tiom da bela Skotlando ene de nur kelkaj tagoj. Certe ne maltrafu la internacieco-plenan kunkongreson de la Esperanto-asocioj brita kaj skota. Informoj estas haveblaj sur la retpaĝo britakongreso.org aŭ ĉe Viv en la oficejo (0845 230 1887). La kunkongreso okazos inter la 20a kaj la 22a de aprilo (plus du tagoj por la postkongreso).

Tim Owen

Visit to Argentina

Throughout my adult life I have been able to use Esperanto to good effect on my travels.

Thanks to Esperanto

When I spent a year in Bordeaux (1971–2) as an English assistant, it was thanks to Esperanto that I found a bed when I arrived. After an unpleasant night spent at Bordeaux railway station, I remember my joy when Sinjoro Lavallée, then the local representative of UEA, and his wife came to find me and offer me more comfort, and a period of using Esperanto before adjusting to spoken French.

More than forty years have passed, and I still find Esperanto of great help when in another country, particularly when I have little grasp of the local language. For a little over two weeks in November and December I was in Argentina with the aim of visiting the Welsh-speaking community in Chubut province.

Sticky cake

I spent a few days in Buenos Aires, and there I took the opportunity of visiting a class at



the offices of the national Esperanto organisation. I was able to explain a little about Britain and of Wales within it and get the insiders' view of this huge country. They were particularly welcoming and gave me my first taste of the local (very sticky!) cake.

After flying south to Patagonia, I was able to meet Leonardo, a biologist in Puerto Madryn. He hadn't been aware that the name of his home town was originally Welsh, Porth Madryn! Together we visited the site where the Welsh colonists first came ashore back in 1865.

Two weeks in Y Wladfa

After a couple of weeks in 'Y Wladfa' – the Welsh name for the original colony – where I could use Welsh with the descendants of the early settlers (although their Welsh was tinged with a Spanish accent),

I flew back to Buenos Aires where I had the pleasure of taking coffee and sticky cake in the garden of Silvia Rottenberg, President of the Argentine Esperanto League.

Argentinian 'UK' in 2014?

Silvia told me that Argentina is hoping to host the *Universala Kongreso* in that country in 2014. I do hope their application is successful, because I would love an excuse to return.

Whilst there are Welsh-speakers in, for example, Gaiman, Trelew, Esquel and Trefelin, the language is now rarely heard on the streets. Indeed, this situation reminds me of Esperanto. It is quite possible to visit these towns and not hear a word of Welsh. This reminds me of the frequent comment made by journalists, "I've never met anyone who speaks Esperanto". Of course, that journalist may well have come across Esperanto-speakers in the workplace or socially, without Esperanto ever being mentioned.

Hilary Chapman



Left: Hilary (on the left) with Leonardo at the spot where the first Welsh settlers landed. Above: Hilary with Esperantists in Buenos Aires.

Hanojo – ĉefurbo de Esperanto 2012

Hồ Chí Minh kaj la lingvo

De la 28a de julio ĝis la 4a aŭgusto 2012, la ĉefurbo de Vjetnamio estos ankaŭ la ĉefurbo de Esperanto. Ĝi akceptos la 97an Universalan Kongreson de Esperanto.

Esperanto estis multe uzata dum la rezistado kontraŭ la francoj kaj poste la usonanoj. Poligloto, ŝtata prezidanto Hồ Chí Minh ne nur interesiĝis pri la lingvo, sed li lernis ĝin en Anglio kaj parolis ĝin. Tion konfirmas la sekva artikolo de Ĉina Radio Internacia "Hồ Chí Minh kaj Esperanto" <<http://esperanto.cri.cn/1/2006/12/27/1@51427.htm>> (eltiraĵo):

"Nuntempe, surbaze de fidindaj fontoj de informado mi malkovris, ke li scipovis ankaŭ Esperanton, kaj Hồ Chí Minh reale estis esperantisto. De 1914 ĝis 1917 Hồ Chí Minh vivis en Anglio. Krom la anglan lingvon, li lernis ankaŭ Esperanton, partoprenis la sindikatan movadon kaj la skoltisman organizaĵon de Anglio. Tiutempe anglaj skoltoj ŝatis paroli Esperanton en siaj kunsidoj kaj renkontiĝoj.

"Post la Aŭgusta Revolucio de 1945 krom la francan, anglan kaj ĉinan, la Radiostacio de Vjetnamio uzis ankaŭ Esperanton por elsendi siajn novaĵojn tra la mondo. Prezidanto Hồ Chí Minh sugestis al tiama direktoro de Voĉo de Vjetnamio, ke Esperanto, krom aliaj lingvoj, estu utiligata por disvastigi tra la mondo la Deklaracion de Sendependo de Vjetnamio. Tiamaniere Vjetnamio estis la unua azia lando uzinta la internacian lingvon en radio. La ĉiutaga radio-elsendo en Esperanto

daŭris de septembro 1945 [...]

"En 1954, post la subskribo de la Ĝeneva Konvencio por Paco en Hindoĉinio, internacia kontrolo delegacio konsistanta el reprezentantoj de Hindio, Kanado kaj Pollando alvenis Vjetnamion por efektiviĝi sian funkcion. La delegacio estis akceptita de la Prezidanto Hồ Chí Minh. En tiu renkontiĝo Prezidanto Hồ parolis angle kaj france kun la gastoj. Turninte sin al polaj delegitoj li subite demandis: "Ĉi tie ĉeestas reprezentantoj de Pollando, la



Emblemo de la ĉi-jara Universala Kongreso en la vjetnama ĉefurbo



patrujo de Doktoro Zamenhof, la kreinto de la internacia lingvo. Do kiu el vi povas paroli Esperanton?" Du el ili levis siajn brakojn. Hồ Chí Minh montriĝis ĝoja kaj de tiu ĉi momento li babiladis kun tiuj poloj en Esperanto. [...]

"En 1968, unu jaron antaŭ sia morto, dum vizito al aviadistoj de la Popolaj Armejoj de Hanojo, en intima konversacio Hồ Chí Minh foje klarigis al ili pri Esperanto. Li diris: "Ĉiuj nacioj, krom sian patrinan lingvon, povas lerni nur Esperanton por egalrajte kontaktiĝi unu al la alia. Esperanto estas facila por la ellernado kompare kun la nacilingvoj."

RETE KAJ LETERE

Is Esperanto Romance?

Dear Editor,

There has been discussion of the distinction between natural and artificial languages (article by Terry Watts, *EAB Update*, January–March 2012).

A linguist making a study of Esperanto texts, without knowing anything of the language's origins or history, would find that it is a member of the Romance branch of the Indo-European language family. In other words it could have descended from Latin in a speech community. In vocabu-

BY E-MAIL AND LETTER

lary it has borrowings from other languages; in morphology it shows the result of many analogical smoothings; but borrowing and analogical smoothing are processes that happen abundantly in all languages.

Having concluded this, the linguist might well be struck by the extreme fewness of the rules needed to describe the language. This too could be a natural feature, like the fewness of phonemes in Hawaiian; and for all I know there are some natural languages with unusually small sets of syntactic or morphologi-

cal rules. The linguist might suspect it to be the result of the language's having been invented, or simplified by decree, but proof of this would have to wait for historical evidence.

We happen to know that Esperanto was invented. But this does not make it different in nature or functionality from natural languages.

Incidentally, Watts refers to the views of Chomsky and Pinker that human languages are all so similar that they must share a particular fundamental grammar hard-wired into the human brain. To me this suggests a surprising lack of experience with distant languages. What strikes one about English, Turkish, Swahili, and Navajo is their fundamental difference. And the human brain has been inventing languages such as Fortran and C which contain no equivalents of our grammatical categories.

Guy Ottewell,
Lyme Regis

(Editor: *Perhaps not surprisingly, this subject has created some interest. Two works of prime importance (particularly the first, which is a brilliant scientific, descriptive analysis of the language), are: John C. Wells: Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto. Rotterdam:*

UEA, 1978. 76p. ISBN 92-9017-021-2, and Claude Piron: Esperanto: Ĉu Eŭropa aŭ Azia Lingvo? Esperanto-dokumentoj 10E. Rotterdam: UEA, 1977. 32p.)

✉/✎/✉

"Forward-looking approach"

Sir,

I was fortunate enough to attend the last Drondo at Wedgwood Memorial College in January and I have been a regular visitor to the Butler Library and Esperanto Office at Barlaston since last summer. I thought it worth noting that there has been a step change in the professionalism of the organised Esperanto movement in this country since my previous contacts with it over the last 30 years or so.

The eccentric image which Esperanto has in this country has always been a barrier to real progress and only a thoroughly professional approach can ultimately combat this. The efforts of Viv O'Dunne in the Esperanto Office are key in this regard but also the forward-looking approach of the likes of Tim Owen and Ed Robertson is a breath of fresh air.

The 21st century requires a very different form of organisa-

tion than that which was usual in the 20th. EAB appears to be refocusing itself both as a provider of 'Esperanto services' to support the existing Esperanto community and as an advocate for the benefits of the international language and the traditional ideals of the movement. This is a refreshingly practical strategy which deserves to succeed in the future.

Paul Dennett

✉/✎/✉

"Dankon al la brita asocio"

Karaj,

Je la nomo de Afrika Oficejo kaj de tiu de Afrika Komisiono de UEA, mi dankas pro la disponigitaj lernmaterioj (*Esperanto Mini-Course*). Dankletero aparte aperos en la 17a numero de nia bulteno.

Esperable la afrika movado denove povas kalkuli je via malavara helpo. Okazon mi kaptas por ĉion bonan deziri okaze de la nova jaro 2012.

Jean Codjo
(membro de AK kaj respondeculo pri AO)

✉/✎/✉

Tiamaniere oni povas spici ...

Karaj,

Mi ĵus partoprenis en lingvistika konferenco en Hajderabado. Organizis ĝin la Angla kaj Fremdlingva Universitato. ...

Mi verkis mian tekston sufiĉe frue, kaj la organizantoj instruis i.a. ankaŭ mian tekston al la gestudentoj partoprenontaj la konferencon. Havante la tempon trankvile rigardi la tekston, ili sendube rimarkis, ke mi enplektis Esperanton en la argumenton, kaj referencis al la verko *Vojaĝo inter la tempoj* de Kalocsay. Por pligrandigi la varban efikon de mia laboro en Hajderabado – urbo, kie Giridhar Rao kaj aliaj

Danko el Kenjo

Antaŭ nelonge EAB ricevis la jarfinan mesaĝon de la prezidanto de Kenja Esperanto-Asocio. Jen du alineoj:

"Lasta jaro finiĝis kaj nun komenciĝas nova jaro 2012. Mi dankas ĉiujn esperantistojn en Kenjo ankaŭ eksterlandon por iliaj kontribuoj en nia lando, kaj ĉiujn kreskantajn esperantistojn en Kenjo. En la lasta jaro sen geamikoj de la mondo ni ne farus ion pri Esperanto en Kenjo – kun ili, ni iomete progresas. "Unue mi dankas la britan asocion ..." – kaj la mesaĝo aparte laŭdas la helpon de "David Kelso; li ne forgesis nin."

Notinda estas la daŭra bezono de helpo de "geamikoj de la mondo" por ke Esperanta agado okazu en Kenjo kaj aliaj partoj de Afriko. Kaj tiu mesaĝo plue atestas, ke ankoraŭ oni sentas dankemon pro la bona agado de David Kelso, kiu tiel tragike malaperis antaŭ jam pli ol jaro, tiam la sekretario de EAB.

povos facile daŭrigi la semadon – mi tute eksplicite reliefigis dum mia surpodia prezento la kontribuon de la esperantologio al la internacia studado de la verbaj aspektoj kaj eventprofiloj ('verboj de daŭro kun rezulto, de daŭro sen rezulto, de rezulto sen daŭro').

Pro tiu mia decido, la svedaj lingvistoj Björn Lundquist kaj Anders Holmberg poste private demandis pri Esperanto, kaj la gestudentoj jam konantaj Esperanton trovis okazajn respondi demandojn de siaj gekolegoj. Giridhar Rao vizitis la universitaton en la dua tago, kaj verŝajne havos okazon prelegi pri Esperanto al studenta publiko; li kaj Mina Dan jam semis tie en 2011.

Al Anders (kaj Gytte) mi trafis paroli pri la esperantigo de *Sep fratroj* de Aleksis Kivi, kaj montrigis, ke ili ne scias pri tiu verko kaj nur nebule scietas pri la aŭtoro [la unua granda finlingva romanisto]; ili poste guglis kaj revenis al mi kun amaseto da faktoj; mi evidente vekis ilian interesigon pri siaj finnaj najbaroj.

Tiamaniere oni povas spici siajn jam alisektore funkciantajn rilatojn kun laborgekolegoj trans limoj kaj almenaŭ iom plikonatigi la kontribuojn de esperantistoj.

Probal Dasgupta
Linguistic Research Unit,
Indian Statistical Institute,
Kolkato



Serĉas novajn geamikojn

Saluton !

Ni serĉas familiojn Esperantajn, kun kiuj retumi kaj eventuale renkontiĝi. Ni estas eta Esperanta grupo en la franca Ĵuraso, 80 km-ojn de la svisa limo.

En nia grupo estas pluraj familioj kun infanoj inter 3- kaj 10-jaraj.

Emmanuel Desbrieres
nome de JURA-Esperanto
<http://jxuraseo.free.fr>

Internacia Amikeca Renkontiĝo en Aylesford, Kent, okazos de vendredo la 21a ĝis lundo la 24a de septembro 2012. Eblas aliĝi ankaŭ nur por parto de la semajnfino. Informojn kaj aliĝilon petu de Anica Page, aŭ per telefono: 01908 564004, aŭ per retpoŝto: anica_page@btinternet.com.



Jubilee salute

Dear Geoffrey,

Can you use the letter below, sent to us on the occasion of our Jubilee Year?

Simon Nye wrote The Last Salute – a BBC TV comedy where one of the characters was an Esperanto-speaker. Apart from being a prolific comedy writer, he also writes Dr Who episodes. See www.bbc.co.uk/pressoffice/pressreleases/stories/2004/08_august/20_cb_nye.

Brian Barker

Dear Brian,

Many thanks for sending me your Esperanto leaflet. Great to see you are still going strong and even expanding.

If I get a chance to refer to Esperanto in my work I certainly will.

Good luck in 2012.

Simon (Nye)



Hungara renkontiĝeto

Saluton!

Mi volas informi vin pri la renkontiĝeto GEO. Ĝi okazos en Hungario por ekskursemaj kaj ludemaj esperantistoj. Ni aparte bonvenigas familiojn kun infanoj.

La renkontiĝeto okazos inter la 11a kaj 15a de julio. Jen la hejmpaĝo: <http://geoesperanto.xoo.hu/>.

Familio Dévai, Hungario



Ankaŭ IJK nun en Hanojo

Estimataj britaj esperantistoj,

Kiel Vi scias, Japanio estis la gastiglando de la Internacia Junulara Kongreso 2012, sed pro organizaj malfacilaĵoj la japana LKK devis rezigni.

Pro tio, TEJO devis traserĉi anstataŭan solvon. El proponoj de diversaj organizaĵoj, tiu de Vjetnama Esperantista Junulara Organizo (VEJO) estis taksita la plej bona. VEJO kuraĝe akceptis tiun gravan laboron, tiel 68a IJK oficiale okazos en Hanojo ĉi-jare.

Pro la mallonga tempo, multaj malfacilaĵoj atendas VEJO-n. Tamen, ni, LKKanoj, klopodas prepari IJK-n tiel, ke ĝi estu profesia, ekscita kaj Esperanta. ...

Por tio, ni esperas ricevi helpon kaj subvenciojn de Esperantaj individuoj kaj organizaĵoj, kaj spirite kaj materie.

Se Vi povas kaj pretas subteni la okazigon de la 68a IJK, bonvolu skribi al la retadreso de la kongreso: ijk68a.hanojo@gmail.com kaj sendi Vian subvencion al UEA-konto ijkb-b.

La nomo de ĉiuj, kiuj patronos la junularan kongreson, aperos en la kongresa libro kaj retpaĝo. Ni ankaŭ bonvenigas reklamojn.

Via ĉeesto kaj kontribuo certigos la sukceson de la kongreso.

LKKanoj de IJK 68a en Hanojo

That online 'interview' for the BBC!

Tim Owen is sorry what resulted from that online BBC 'interview'. *EAB Update* did receive a couple of complaints. In fact, he didn't actually *give* the interview. An interview was previously given on BBC radio, and people who heard that original broadcast thought it was all right. The online version of it, however, was hacked from it, and Tim was badly misrepresented. The original context was everything, but this wasn't presented in the online article.

En mia Liverpola hejmo

www.jeb.org.uk

Ĉi-semajnfine okazis en Liverpola improvizita kunveno. Antaŭ ses monatoj Agneau translokiĝis norden por komenci skribi sian doktoriĝ-tezon ĉe la renoma Universitato de Liverpola. Agneau – estanta tre for en la malvarma nordo kaj multe sentanta la mankon de la aliaj membroj de Londona Esperantista Junularo (LEJO) – ĉi tiuj decidis inter si, ke jam estas tempo por viziti lin kaj lian belan novan hejmurbon.

Malfruiĝoj de la trajnoj malhelpis la vojaĝon. Fine alvenis Paul, Neil, Sasha kaj Dudu sabate vespere. Post manĝi, ĉiuj decidis, ke ili preferus simple resti en la domo de Agneau por malstreĉiĝi kaj rekapti perditan tempon anstataŭ eliri por noktumado.

Dimanĉe oni vizitis la urbon, spitante la malvarmon kaj la

Marion, Neil kaj Dudu apud statuo de Ken Dodd en Stacidomo Lime Street en Liverpola

venton de sur la rivero por iri vidi la ikonajn Dokojn de Albert, iamajn vartenejojn ŝanĝitajn en ŝikajn apartamentojn kaj manĝejojn. Tie troviĝas kelkaj muzeoj, interalie la Internacia Muzeo pri Sklavigado kaj la Galerio Tate. Ĉar estis la unua fojo de la vizitantoj en la naskiĝ-urbo de la 'Fab Four', oni ne povis eviti viziton al la Muzeo de The Beatles.

Ĉiuj pasigis bonegan viziton en Liverpola, aparte pro tio, ke ĉiuj LEJOanoj povis revidi unu la alian, eĉ se temis pri mallonga restado. Pro tio la adiaŭo estis iomete malfeliĉa afero. Mi persone ne povis ĉeesti la renkontiĝon. Tion mi multe bedaŭras. Cetere, Marteno last-momente trovis, ke li ni povos partopreni. Pro tio, mi esperas, ke mi povos konviki la sudulojn reveni iam al Liverpola por JEB-kunveno kaj mi povos montri al ili pli de la tre vizitinda urbo.

Baldaŭ en Kembriĝo

La sekva JEB-renkontiĝo okazos komence de marto en Kembriĝo. Mi ne volas tro paroli pri ĝi nun, ĉar mi plene raportos pri ĝi la venontan fojon. Sabatmatene ni iros viziti la urbon kaj espereble ankaŭ povos boatumadi. Posttagmeze ni luos ĉambron por fari nian propran kongreseton kun ludoj kaj prelegoj.

Tiam okazos la ĉi-jara jarkunsido de JEB, kaj ni elektos la novan komitaton. Ni priparolos, ĉu ŝanĝi la rolojn de la komitatoj. JEB iam havis la saman problemon, kiel plej bone ordigi kaj dividi la laboron de la komitato. Eble anstataŭ havi nur unu prezidanton, ni havu prezidanton kaj vicprezidanton, kaj iu respondecos dum duona jaro, kaj mezjare ili interŝanĝos rolojn. Tiel pli da homoj povos estri pli ofte.

Daniel White
JEB-Komitatano
komitato@jeb.org.uk



• **2a Esperantista Migrado Aŭtuna en Germanio**

Tio okazos inter la 30a de septembro kaj 5a de oktobro 2012 sur la migrovojo Rheinsteig, tra la arbaro Binger. Oni tranoktos en Gastejo Elsenburg en Kaub am Rhein. Informoj kaj aliĝilo troviĝas en la retpaĝaro <www.esperanto.de/gea/ema2012>. Organizas Germana Esperanto-Asocio.

• **ILEI petegas helpon**

ILEI – nia internacia instruista organizaĵo – jam de multaj monatoj laboregas starigi multlingvan retejon. Prezidanto Stefan MacGill diras: “La sola bremsilo ĉe ILEI estas ĝia decida manko de kapablaj kaj laborpretaj kunlaborantoj, ... Jam de pli ol jaro ni vane serĉas iun por prizorgi niajn eksterajn rilatojn (plus dekon da pliaj oficoj). Se vi sopiras je ILEI, kiu elpaŝos plurlingve kaj aktive, proponu vin mem esti nia komisiito (aŭ ekde julio 2012) nia estrarano pri la eksteraj rilatoj.” Informoj ĉe www.ilei.info; retadreso: ilei.sekretario@gmail.com.

• **Ken Livingstone memoirs**

Ken Livingstone, former Mayor of London and candidate for that office again in May, mentions Esperanto in his recently published book *You Can't Say That – Ken Livingstone Memoirs* (Faber & Faber, 2011). From page 157:

One of my supporters was Kate Hoey in Hornsey, but ignoring my pleas to stay she stood down from the GLC in order to fight Dulwich in the next general election.

Kate's loss was balanced by the selection of Dave Wetzel in Hammersmith, who, like his father, had worked on the buses as a conductor and driver. He was obsessed with Esperanto and insisted on signing all his letters "Yours in socialism". It took several attempts for me to persuade him to stand, as he believed the GLC was filled with living fossils.

• **Projekto Indiĝenaj Popoloj**

Projekto Indiĝenaj Popoloj (PIP) celas prezenti Esperanton al indiĝenaj popoloj tra la mondo kaj faciligi ilian interkomunikadon per la uzado de Esperanto. PIP kredas, ke indiĝenaj popoloj ofte trovas sin en similaj situacioj, ekzemple, perdo de terenoj, kutimoj aŭ mondoperceptoj.

Ili plu kredas, ke komunikado helpas indiĝenajn popolojn subteni unu la alian kaj pli bone evoluigi siajn kulturojn.

La Kalumeto (t.e. indiana pacpipo) estas la kvaronjara bulteno de PIP. Ĝi pritraktas aferojn de PIP kaj de indiĝenaj popoloj, kaj diskonigas eretojn el la voĉaj, ceremoniaj kaj skribaj esprimaĵoj de indiĝenaj kulturoj kaj unuopuloj.

PIP nun sendas aktualajn numerojn de *La Kalumeto*, kun nacilingva resumo, al diversaj universitatoj, fakoj de UNO, ne-registaraj organizaĵoj, kaj al aliaj organizaĵoj kiuj celas apogi indiĝenajn popolojn. Se vi havas sugestojn por plibonigi la bultenon, aŭ se vi havas artikolon, recenzon, tradukon aŭ simile por aperigi, bonvolu kontakti: Erik Felker; rete: ejfelker@dslexreme.com.

(Dave Wetzel became vice-chair of Transport for London when Ken Livingstone became Mayor of London in 2000.)

(Thanks to Paul Hewitt for the information.)

• **Somera kongreso ĉe la marbordo mediteranea**

De la 18a ĝis la 25a de aŭgusto la 79a Itala Kongreso de Esperanto okazos en Mazaradelvalo, Sicilio, urbo kies urbestro volas igi ĝin centro de Esperanto. Li venis al nacia kongreso por inviti kaj helpis malfermi kursojn en ĉiuj lernejoj de sia urbo, kie pli ol 500 gejunuloj lernas Esperanton.

La urbo estas facile atingebla kaj de la flughaveno de Trapani kaj de tiu de Palermo. La loĝado (sep tagoj kun manĝoj) kostos en dulita ĉambro 390 eŭrojn, en unulita 480, por gejunuloj 240 eŭrojn.

Aliĝo eblas per la retpaĝaro: <http://kongreso.esperanto.it>, kie troviĝas pliaj informoj. La retadreso estas: kongreso@esperanto.it.

• **YouTube on Esperanto – in Welsh for first time**

Apparently, the first YouTube message about Esperanto in Welsh appeared on 21 January!

• **Kia estus Eŭropo sen EU?**

Eŭropa kaj Alp-Adria konferencoj okazos de la 9a ĝis la 12a de majo en Triesto, Italio. La temo estos “Kiel estus Eŭropo hodiaŭ, se Eŭropa Unio ne ekzistus?”

Pliajn informojn (aliĝilo, tranoktejoj ks.) oni ricevas rete, skribante al noredv@teletu.it aŭ kaj testudo.ts@gmail.com aŭ poŝte: Triesta Esperanto-Asocio, Via del Coroneo 15, IT-34133 Trieste. Vidu ankaŭ ĉe la ttt-ejo de Eŭropa Esperanto-Unio, sub ‘Konferencoj’: www.europo.eu/eo/konferencoj.

• **Argentina vino Esperante**

En Argentino aperis televida filmeto en Esperanto por reklami la argentinan vinon: *Unu vino, mil babiladoj* <<http://www.youtube.com/watch?v=F2wIYCpAOs>>.

• **BT reklamas en Esperanto**

Laŭdire, video ĉe YouTube montras uzon de Esperanto en plurlingva reklamo fare de la brita telekomunika firmao BT Global Services por diskonigi siajn servojn: BTGS: Who we are, what we do <<http://www.youtube.com/watch?v=ZcotIKtONCA>> (BTGS: *Kio ni estas, tio, kion ni faras*). Ĉu vere?

- **Intervjuo en Esperanto ĉe Itala Televidkanalo RAI**

Fine de aŭgusto prof. Probal Dasgupta, prezidanto de UEA, partoprenis kiel ĉefpreleganto la italan kongreson en Torino. En ties kadro intervjuis lin la kultura sekcio de Itala Televido RAI. Oni povas spekti la elsendon ĉe la sekva adreso: www.youtube.com/watch?v=FARp5i_UE2c.

La intervjuo okazis en *Esperanto*, ĉar ankaŭ la ĵurnalisto parolis Esperanton. La italigo de la interparolo aperis subtekste. La intervjuinto estas Giulio Cappa, konata esperantisto kaj sekciestro de la kultura fako de la televidkanalo.

- **Informado en Centra Ameriko**

En la renoma kaj vaste legata ĵurnalo *Nuevo Diario* de Nikaragvo aperis trion-paĝa artikolo pri Esperanto. La inform-kaj instruvojaĝo, kiun financis kaj organizis 'Esperanto Internacia' estis, laŭdire, eksterordinare sukcesa. Okazis multaj intervjuoj por radiostacioj kaj gazetoj, kaj tri por televido. Krome oni aranĝis diversajn informstandojn, prelegojn, kaj kontaktis edukajn instancojn.

- **"Neeltenebla 'Globish'"**

Franca ĵurnalisto kaj verkisto Éric Zemmour havas regulan kronikon ĉe la plej aŭskultata radiostacio de Francio, RTL (Radio Télé Luxembourg). Lia temo je la 8a de februaro estis "L'insupportable domination de l'anglais" (La neeltenebla superrego de la angla).

Li klarigas, ke la angla estas ne nur internacia lingvo, pli

- **'Google Translate' aldonis Esperanton**

Jam elektebla delonge kiel interfacca lingvo de Google, Esperanto transiris novan etapon. Brants Thorsten, scienca esploristo ĉe Google Translate anoncis en februaro: "Esperanto estas unu el la 64 traduklingvoj de Google Translate." Traduko de kaj al Esperanto baldaŭ disponeblas en translate.google.com.

La teamo ĉe Google Translate laŭdire estis vere surprizita pri la 'alta kvalito' de maŝina tradukado por Esperanto. Kvankam la sistemo ankoraŭ tre foras de perfekteco, pliboniĝoj estas antaŭvideblaj. Esperanto sendube estos pli videbla, kaj tio kontribuos al disfalo de antaŭjuĝoj.

ĝuste iaspeca 'Globish', sed ilo de superrego kaj mensmanipulado serve al la nuna politika-ekonomia kaj sociala mondordo.

- **Jaro de Tibor Sekelj**

EEU deklaris ĉi tiun jaron 2012 la Jaro de Tibor Sekelj (1912–88). La 14an de februaro oni festis lian centjariĝon. Tibor Sekelj estis elstara esploristo kaj vojaĝanto, ĵurnalisto kaj verkisto, kiu interalie estis ankaŭ Fratulo de la brita Reĝa Geografia Societo ekde 1948. Lia verko *Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo* (1979) restas la plej tradukita kaj plej grandkvante eldonita libro originale verkita en Esperanto.

- **Esperanto-Kurso en Maroko**

Ekde januaro Rafaelo Mateos instruis Esperanton en la maroka urbo Feso. La kurso okazis en lernoĉambro de altlernejo por frizarto. La kurso daŭris dek tri tagojn kaj preskaŭ certe estos pliaj kursoj por progresantoj kaj novaj interesitoj.

- **Feriado en Pollando**

'Olŝtinaj Tagoj de Esperanto' okazos de la 5a ĝis la 10a de

julio en Varmia-Mazuria Universitato Olsztyn-Kortowo, laŭdire unu el la plej belaj universitataj urbetoj en la lando, kaj aliloke en Olsztyn. Okazos simpozio pri la temoj "La 125-jara jubileo de Esperanto" kaj "La 70a datreveno de pereigo de Lidia Zamenhof". Detalaj informoj pri la aktuala programo kaj kostoj troviĝas ĉe www.Esperantowolsztynie.pl.tl; retadreso: angiel@ols.Vectranet.pl.

- **Semajno en Francio**

La franca Kulturdomo de Greziljono okazigas sian duan Printempan Semajnon de la 13a ĝis 21a de aprilo, kunlabore kun ILEI. Oni povas akiri pliajn informojn kaj aliĝi rete ĉe: www.gresillon.org/printempo.

- **Esperanto en la plej granda pariza librovendejo**

Esperanto aperis en montrofenestro de la plej granda pariza librejo Gibert Joseph. Temas pri ekspozicio de tradukoj de *Le petit prince*, de Antoine de Saint-Exupéry, en 28 lingvoj kaj 38 versioj, inkluzive de *La eta princo* en Esperanto. Aperis ankaŭ afiŝo de la kuneldonistoj de *La eta princo* en formato A3 kun surprisita Esperanto-flaĝeto kaj la indiko 'Esperanto', por ke la publiko sciu pri la lingvo de la eldono; kaj apude troviĝas la emblemo de la 125-jariĝo. Tio estas rezulto de klopodoj de la eldonisto de la albumoj de *Aventuroj de Tincjo* [Tintin] – ĉe Gibert Joseph.



- **Ĉu la plej granda ŝildo 'Esperanto' en la mondo?**

Ĉe Hotelo-Kongrescentro Esperanto en Fulda, Germanio, aperas la apuda pli ol 10-metrojn alta ŝildo.

- Lord Robert Cecil

Laŭ informo de historiisto Ulrich Lins, la libro *Guarantee of Peace. The League of Nations in British Policy 1914–1925* (OUP, 2009), verkita de Peter J. Yearwood "larĝe traktas la agadon de Robert Cecil, kiun la recenzanto nomas 'pasia esperantisto', kaj tute simpatie rilatas al li."

En sia libro *La danĝera lingvo* (Gerlingen: Bleicher, 1988; 1a eld.) Ulrich Lins skribis: "Lord Robert Cecil, amiko de Esperanto, admonis la Komisionon por Intelekta Kunlaborado 'memori, ke mondlingvo ne estas bezonata nur de intelektuloj, sed antaŭ ĉio de la popoloj mem'..."

Henri Masson (espero.hm@wanadoo.fr), aktivega franca informanto pri Esperanto skribis, ke estus bone trovi la citaĵon en la originala angla, se iu bonvolus.

- Landa kongreso en Sud-Afriko

La nacia kongreso de Esperanto-Asocio de Suda Afriko okazos de la 27a ĝis la 29a de marto norde de Pretorio.

- Indian-Italian language barrier

According to the *Deccan Herald* of 21 February, Kerala police investigating a tragic shooting of two Indian fishermen by an Italian ship's security guards off Alappuzha were faced by a major language barrier.

The two Italian marines arrested in connection with the killing do not speak any language other than Italian.

The police and Italian diplomats used the services of a Catholic priest, who speaks Italian, during the interrogations.

"Each question and answer took about ten minutes," said a top police official. "It was a long process. First we asked the question in Malayalam or English. The translator translated it for the marine men [sic]. Then, they asked the Consulate General if the men could answer the ques-

Nord-Okcidenta Esperanto-Federacio invitas al Preston

La Printempa Kunsido de la Nord-Okcidenta Esperanto-Federacio okazos je sabato, la 12a de majo 2012. La gast-parolanto estos Tim Owen, sekretario de Esperanto-Asocio de Britio.

La aranĝo inkluzivos varman lunĉon kun deserto kaj teon aŭ kafon.

La kunsido okazos, kiel kutime, ĉe Empire Services Club, Hartington Road, Preston PR1

8PP. Tiu komforta loko estas proksima al la stacidomo de Preston, apud Fishergate Hill.

Por aliĝi, skribu ĉekon por £10, pagendan al 'South Lancashire Esperanto Group', kaj sendu ĝin al Andrew Wheatley, P.O. Box 103, Lytham St Annes FY8 3GU. Bonvolu diri al Andrew, se vi estas vegetarano.

Por pli da informoj, kaj el-printebla aliĝilo, vizitu nian TTT-ejon ĉe <http://esperanto.99k.org/>.

tion. If he said okay, the marine men answered it in Italian. Then the translator translated the answer into Malayalam."

- Oficialaj Esperanto-kursoj

Germain Pirlot (Belgio) kompilis aktualigitan liston de oficialaj kursoj de Esperanto en altnern-ejoj kaj universitatoj. Ĝi estas ricevebla per peto al li, kun antaŭparolo de Dennis E. Keefe. (Bedaŭrinde, multaj kursgviantoj ne reagis, pro kio la listo ne estas komplete.)

- ESF finances visit to China

China is also becoming a 'super-power' among users of Lernu.net, the online Esperanto learning site. Not only does China have the fastest-growing group of registered Lernu-users, but also one of the highest percentages of new visits to Lernu.net. To learn ways of cultivating this fertile ground, some of E@I's and Lernu's key activists travelled throughout China in February.

E@I and Lernu activists Peter Balá, Indr Pileckyt, Yevgeniy and Neringa Gaus visited several Chinese cities, meeting local Esperantists. The trip was sponsored by the Esperantic Studies Foundation (ESF) as part of this

year's redesign and expansion of Lernu.net.

Due to the success of SES (Somera Esperanto-Studado) in Europe, the team is, in addition, looking for potential locations for a similar event in Asia.

So far ESF have raised almost €9 000 in their campaign to collect €100 000 (see <http://kampanjo.ikso.net/en/>).

- UK eventuale en Francio

Teamo de Esperanto-France jam invitis la Universalan Kongreson al Lille por 2015. Se tio ricevos la aprobon de UEA, ĝi prezentos facilan vojaĝon por britaj esperantistoj. □

New Members of EAB

Stefan Dung, Chesterfield
James Puchowski, High Wycombe


Deceased members

Roy Lister, Bournemouth
June Miles, Watford, latterly Castle Douglas

CONGRATULATIONS

Completed the Accelerated Course

Joan Butler, Bristol



Utila Estas Aliĝo estas bele produktita libro, verkita en klara kaj flua lingvaĵo, kun riĉa kvanto da fotoj el la historio de Universala Esperanto-Asocio.

Post la apero de la unua libro de Zamenhof en 1887, sendube la plej grava dato en la historio de Esperanto estas la fondo de UEA dudek unu jarojn poste, en 1908. Okaze de sia 100-jara jubileo, UEA aperigis ĉi tiun eldonaĵon. Ĝi ne estas plena analizo de la historio de UEA, sed la tri kontribuajoj celas lumigi la historion kaj stimuli al pliaj esploroj.


La unua kontribuajo elstarigas la ĉefajn trajtojn de la agado de UEA dum cent jaroj. La aliaj du koncentriĝas al personoj, kiuj komence kaj dum granda parto de la ekzistado de UEA profunde influis la asocian farton: Hector Hodler kaj Ivo Lapenna.

D-ro Ulrich Lins estas historiisto, kiu estas jam bone konata pro sia gravega libro *La danĝera lingvo* (1988) pri persekutoj kontraŭ Esperanto.

- *Utila Estas Aliĝo* de Ulrich Lins. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio, 2008. 126 paĝoj. 16 x 23,5 cm. Ilustrita. ISBN 978-92-9017-105-8.

Prezo ĉe EAB £12 (plus sendokostoj de 20% = £14,40).

John C. Wells



John C. Wells

English–Esperanto–English Dictionary (Angla–Esperanto–Angla Vortaro)

Ampleksa sed konciza ambaŭdirekta vortaro por komencantaj kaj progresintaj studentoj de Esperanto, kun enkonduka prezento de la gramatiko de Esperanto

Unue publikigita en 1969 de la eldonejo Hodder kiel *Teach Yourself Concise Esperanto and English Dictionary*, la nuna, dua eldono estas zorge reviziita kaj komplete reverkita. Ĝi plene spegulas la hodiaŭajn anglan lingvon kaj Esperanton.

Kun entute pli ol 30 000 kapvortoj, ĝi estas nemalhavebla riĉfonto por uzantoj de Esperanto, tenanta ĉiujn vortojn, kiujn oni bezonas, inkluzive de multaj fakvortoj.

Eldonas: Mondial (Novjorko), 2010 (Broŝurita versio: ISBN 978-1-59569-149-1; Malmole bindita versio kun kromkovrilo: ISBN 9781595691507). Ambaŭ: 508 paĝoj (xlvi + 462). Grando 5.5 x 8.5" (14 x 21,6 cm). Por pli da informoj vizitu la retpaĝaron: www.librejo.com/wells-vortaro.

- *Vendoprezoj ĉe EAB*: La broŝurita eldono kostas £16, la bindita £29, plus sendokostoj po 20%. Reta butikoj: www.fastcart.co.uk/cart/index.php?id=9449&item=Wells+Dictionary – aŭ telefonu al 0845 230 1887.